

John Ellerton, Forpasis tiu tag', Sinjoro	John Ellerton, Ni estis ja en mano Dia	John Ellerton, Finiĝas nun alia tago	John Ellerton, The day Thou gavest, Lord, is ended
---	--	--	--

tradukita de Frieder Weigold

tradukita de Manfredo Ratislavo

tradukita de William John Downes

- | | | | |
|---|--|--|--|
| 1. Forpasis tiu tag',
Sinjoro,
Kaj profundiĝas la
senlum'.
Vi gardis nin de ajn
doloro.
Nin gardu ankaŭ
dum noktum'! | 1. Ni estis ja en mano
Dia,
dum brilis super ni la
Sun'.
Protektu nin per ma-
no Via
dumnokte, Dio, an-
kaŭ nun! | 1. Finiĝas nun alia
tago,
jam venis la vespera
hor'.
Kunvenis ni por ad-
orago
plaĉanta al la Di-
Sinjor' | 1. The day Thou gavest,
Lord, is ended,
The darkness falls at Thy be-
hest;
To Thee our morning hymns
ascended,
Thy praise shall sanctify our
rest. |
| 2. Ni rotacias en la
tagon.
En nokta paco dor-
mas ni.
Kaj portas lumon
trans la maro
La suno, kie brilas
ĝi. | 2. La ter' cirkulas ĝis
la veno
de l' nova tag', ripoz-
as ni
dum tiu nokt' en Via
beno ²
ĝis la mateno, kara
Di'. | 2. Ni dankas Vin,
Savanto nia,
ke sur la tuta mond-
teren'
la sankta eklezio
Via
staradas firme ĉe
posten'. | 2. We thank Thee that Thy
church, unsleeping,
While earth rolls onward into
light,
Through all the world her
watch is keeping,
And rests not now by day or
night. |
| 3. Senĉese kiel la
mateno
Briladas super tera
rond',
Eksonas laŭdo pro
la beno
Al ĉiu sur la vasta
mond'. | 3. Nun kiam en mal-
hel' fordronas
la Sun' en tiu ĉi ves-
per',
multvoĉe Via laŭdo
sonas
alialoke sur la Ter'. | 3. Ruliĝas tero, bri-
las lumo
de ne-ĉesanta
maten-glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-
parfumo
konstante, kiel dolĉ-
odor'. | 3. As o'er each continent and
island
The dawn leads on another
day,
The voice of prayer is never
silent,
Nor dies the strain of praise
away. |
| 4. La suno, kiu ĵus
subiris,
Ja brilas en plu fora
land'!
La gloron, kiun ni
admiris,
Anoncas plu
preĝada kant'. | 4. Ĉar kiel estas
ĉirkaŭanta
la Teron lumo de l'
maten',
senĉese estas pluso-
nanta
preĝado de la homoj
jen. | 4. Ekdormas ni post
sun-subiro;
gefratoj en la okci-
dent'
vekiĝas kun novtag-
aspiro
Vin glori per viv-
elokvent'. | 4. The sun that bids us rest
is waking
Our brethren 'neath the we-
stern sky,
And hour by hour fresh lips
are making
Thy wondrous doings heard
on high. |
| ... | ... | ... | ... |

²aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu! Kaj sole staras via tron', Ke sole via regno re- stu Je fina tag' sub unu kron'.	5. Ja estas, Dio ĉiopova, senlima Via regno, nin konduku al la tago nova en Via regno je la fin'!	5. Formortos mon- daj imperioj, sed Via regno kres- kos plu. Al Vi sin cedos di- nastioj, Venkinto estos vi, Jesu'!	5. So be it, Lord; Thy throne shall never, Like earth's proud empires, pass away: Thy kingdom stands, and grows forever, Till all Thy creatures own Thy sway.
...

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-01-10.

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 - †1987).

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro "Adoru", eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperantoligo (KELI), kanto numero 153.

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15), publikigita 1870.

Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)

Information about the author can be found on the website http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm.